

1311

Jackson, 13mo-2,  
4-3,  
13-14 14mo-5

A

MERIKA

UNIVERSITY OF CALIFORNIA  
JUN 6 1939  
LIBRARY

E

SPERANTISTO



## Make Money By Helping Esperanto!

You can get 33⅓ per cent return on your investment, as soon as you choose to do so, by just spare time recreation.

### *This Is The Way:*

Buy four "sub-cards," for a total outlay of three dollars. Sell these cards at once to friends, neighbors, acquaintances and strangers, for a dollar apiece.

You get *four* dollars for the *three* you spent!



#### USE THIS FORM

*American Esperantist Co.,  
Washington, D. C.*

*I want four sub-cards. I enclose  
\$3.00.*

Put name and address here.

.....  
.....  
.....

#### AS A MATTER OF FACT:

The excellence of your magazine, the extent of its power to promote the Esperanto Movement, its value to advertisers who are testing Esperanto as an advertising medium, and lastly the attitude of the world in general toward Esperanto and toward YOU as an Esperantist,—all this depends upon the rate at which

THE SUBSCRIPTION LIST GROWS EACH MONTH.

## The American Esperanto Book

Standard Edition, cloth bound, postpaid for \$1.00

With *new* subscription to **Amerika Esperantisto**, \$1.50

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, Washington, D. C.

684c  
A5  
v. 13-14

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter January 11, 1911, at the Postoffice at Washington, D. C., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

**AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)**

Maryland Building, Washington, D. C.

**ONE DOLLAR A YEAR**

**Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50)**

**SINGLE COPY TEN CENTS**

Vol. 13

FEBRUARY, 1913

No. 1

### *Are You Interested?*

In having the biggest magazine publishing firm of the United States continue giving an Esperanto story regularly in one of its magazines? Do you realize the importance of this?

Then do your share in making the Editor of the *Cavalier* realize that there are a great many people in this country who enjoy the *Cavalier* more because it has begun inserting an Esperanto story in its pages.

1. Have you written a letter yourself, telling the editor that you like this magazine and that you watch with especial interest for the Esperanto story? *If not, then do it, right away!*

2. Have you asked the editor to send a sample copy to one or two friends of yours who might possibly subscribe if they learned of the Esperanto feature? *If not, then do it, right away!* Write their names and addresses plainly.

3. Have you seen to it that none of your Esperantist friends neglect this duty of writing to the *Cavalier*? *Keep after them till you are sure.*

4. Have you requested at least one friend, who is not yet an Esperantist, to write to the *Cavalier* a few words of appreciation of the magazine and of the Esperanto venture in it? *If not, do it, and do it now!* Your friends will do this favor for you; and while it is a small thing for them to do, it will help you in an important matter.

Here is the address: *Editor, The Cavalier, The Frank A. Munsey Company, 175 Fifth Ave., New York City.*

**PLEASE DON'T BE CARELESS ABOUT THIS.**

If you don't, those who object to Esperanto in the *Cavalier* (and there are some, too) will win the day. *Do you want to be beaten?*

### VISITING ESPERANTISTS

Who come to Washington for the Inauguration of President-elect Wilson, also for the Woman Suffrage Procession, are cordially invited to visit THE ESPERANTO OFFICE, in the Maryland Building, at 1410 H St., N. W. The yellow cars pass the building,—get off at 14th St. The green cars (14th St. line) cross H St.,—get off there and walk west. The Maryland Building is a block and

a half from the Treasury. If you forget these directions, look up ESPERANTO in the telephone directory, and call us up. All rooms of THE ESPERANTO OFFICE will be closed the afternoons of March 3 and 4, but visitors will be welcome at any other time, including Wednesday evening, when the *Internacia Klubo* will be host.

## Kroniko Nordamerika

**A**RTIKOLOJ pri Esperanto, tradukoj el Esperanto, aŭ anoncoj pri kunvenoj, k. t. p. aperis lastatempe en la jenaj ĵurnaloj, inter aliaj: *New York Times*; Gainesville (Fla.) *Daily Sun*; Detroit (Mich.) *Journal*; Detroit (Mich.) *News*; Multaj bohemiaj, slavaj kaj kroataj ĵurnaloj en Chicago kaj alie; *Colorado Springs Gazette* (dufoje); *Durango (Col.) Democrat*; *Durango (Col.) Herald*; Boise (Idaho) *Statesman*; Anacortes (Wash.) *Citizen*; *Journal of the American Medical Association*; *American Journal of Nursing*; kaj ankoraŭ aliaj.

PORTLAND, ME.—La societo kunvenas ĉiumonate, kaj kondukas tri ĉiusemajnajn kursojn sub la instruado de S-ino Tapley, F-ino Morse, kaj F-ino Decelle.

BOSTON, MASS.—Ĉe la jara kunveno la Bostona Societo elektis la jenajn oficistojn: prezidanto, S-ro G. W. Lee; vicprezidanto, Pastro W. E. Hayes; sekretario-kasisto, S-ro Roger Goodland; direktoroj, S-roj Payson kaj Swan, F-inoj Meriam kaj Bibbey.

BALTIMORE, MD.—Nova grupo estas starigita ĉi tie, kiu kondukas du kursojn, ĉiujaŭde kaj ĉiumarde, kaj je ambaŭ kursoj oni komencas bone uzi la lingvon. F-ino Weems estas la instruisto.

CLEVELAND, O.—S-ro Claude R. Hill,

studento en *Case School of Applied Science* (la plej grava inĝeniera universitato en la meza okcidento) paroladis pri Esperanto antaŭ la kursanoj de angla kurso,—kaj kiel rezultato la AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO ricevis tujan mendon por ses lernolibroj. Bonega pruvo de vera intereso!

ISHPEMING, MICH.—S-ro K. G. A. Lind klopodas pri starigo de Esperanto klubo ĉi tie. Adresu lin ĉe 719 Bank St.

ROCKFORD, ILL.—Kurso gvidata de S-ro Karl Fröding funkcias ĉi tie ĉe 417 F St. Nova kurso estis starigita la 29an de januaro.

DURANGO, COL.—Nova grupo estas starigita kaj kunvenas ĉiujaŭde en la Supra Lernejo. La prezidanto estas S-ro C. J. Laube, helpa redaktoro de la *Rico Item*; la sekretario estas S-ro B. Haughey, redaktoro de la *Farmers' Voice*. La grupo bone komenciĝis per abonado al AMERIKA ESPERANTISTO, kaj esperas forte labori.

BOISE, IDAHO.—S-ro Blackstone gvidas Esperantan kurson en la Y. M. C. A., kaj la kursanoj entuziasme helpas je propagando en la urbo.

OAKLAND, CAL.—Ĉe la loka societo S-ro Herbert Harris el Portland, Maine, kaj S-ro Hideyo Uyama el Tokio estis bonvenaj gastoj antaŭ nelonge.

### UNIQUE MEETING IN EDINBURGH.

In January the Esperanto Society of Edinburgh, Scotland, organized a meeting of Edinburgh citizens to greet Abdul Baha, who was visiting that city. A large and intellectual audience was present, presided over by Rev. Dr. John Kelman, the leading Presbyterian minister of the city. A fine organ recital was given by Mr. Alfred Hollins, a blind Esperantist, one of the premier organists of the musical world. After various brief speeches were heard, Abdul Baha addressed the assembly on the subject of Esperanto, the International Language, whose advantages he discussed at length, remarking also "We have commanded all

Bahaiists in the Orient to study this language very carefully, and soon it will become disseminated through the entire Orient. I also beg you, Esperantists and non-Esperantists, to strive energetically for the dissemination and propaganda of this language; for it will hasten the coming of that day of millennium foretold by prophets and seers, in which it is said the wolf and the sheep will drink from the same fountain, the lion and the deer pasture in the same meadow." (Translation from Esperanto version of the original address given in Persian at the meeting.)

## *Esperanto First in Study of Languages*

This afternoon a petition was circulated in the Seventh Grade of the public school, calling attention to the advantages of Esperanto as the first language to be studied after English. Parents are asked to consider the advisability of signing this petition. It reads as follows:

"To the Maryland State Board of Education:

"Whereas, the international language, Esperanto, is proving of great commercial value, and is facilitating communication between all parts of the civilized world, and

"Whereas, this same Esperanto language is easier to master than any foreign tongue, and

"Whereas, Esperanto serves as an admirable introduction to the study of other national languages as well as that of etymology;

"Therefore, the undersigned urgently and respectfully petition the State Board of Education to provide as soon as possible for a half-year course of daily instruction in Esperanto in the Annapolis High School, making this a preliminary course to the study of Latin."

### TESTIMONIALS.

I have often said, in years past, if I were the autocrat of education in the United States, I would not allow any child to study a foreign tongue till he had a term of Esperanto.—Dr. D. O. S. Lowell, Headmaster Roxbury Latin School, Massachusetts.

One who learns Esperanto has ob-

tained an international vocabulary of international roots which lessens by fully 75 per cent the number of words to be memorized in any national language likely to be undertaken thereafter.—The School Review, University of Chicago, February, 1910.

Other equally strong endorsements can be given if desired.

This petition is circulated by courtesy of the County School Superintendent, but without his endorsement. Further information may be obtained from the Rev. James L. Smiley, Annapolis, Md. Box 225."

In distributing the blank petitions Mr. Smiley explained to the pupils that Latin is recognized as a difficult language for children to plunge into immediately upon entering school, but that Esperanto, the easiest of all languages of culture, can serve the excellent purpose of preparing the mind for Latin, French or German.

Esperanto also has a superior claim in that it possesses an immediate commercial and social value. It fits young people for work in offices which do a foreign trade. It opens up a world-vision, enabling even children to correspond with persons of foreign lands. The Esperanto Year Book contains the names of hundreds of would-be correspondents in widely scattered portions of the earth. The rising generation is learning the noble meanings of "international patriotism." Esperanto is one of the great factors in such an education.—*Annapolis Evening Capitol* (Jan. 24).

---

### THE NINTH ESPERANTO CONGRESS

The Ninth International Congress of Esperanto, which was to have taken place in Genoa, Italy, next summer, will not occur in that city, owing to a combination of unforeseen circumstances, but will take place in Berne, Switzerland, during the last week of August, 1913. As Berne, which is of itself a city well worth visit-

ing, is very centrally located, easily accessible, and already the site of several international institutions, such as the Postal Union, etc., the Esperanto Congress should prove very successful here. Details of arrangements will be announced later.

# Official Communications

*Sub ĉi tiu rubriko la redaktoroj voionte presigos komunikadojn de ĉiu esperantista societo, kiu havas inter nia legantaro sufiĉe da anoj aŭ kies speciala fako de laboro interesos niajn abonantojn.*

## The Esperanto Association of North America

Central Office: Washington, D. C.

### PASSED PRELIMINARY EXAMINATION

(*Atesto pri Lernado*)

O. V. Lange, Berkeley, Cal.  
Thurston E. Wood, Washington, D. C.

---

### PASSED ADVANCED EXAMINATION

(*Atesto pri Kapableco*)

William B. James, Melrose, Mass.  
Robert Bruce, Washington, D. C.  
Isabelle McCaffrey, Washington, D. C.

---

### SIXTH NORTH AMERICAN ESPERANTO CONGRESS

While it is the custom to hold the annual North American Esperanto Congress at some time during July or August, the place for the coming convention has not yet been decided upon, and the Executive Committee will be glad to receive suggestions and invitations from those cities where the Esperantists would like to have the convention take place. Please take this matter up at your next club meeting, and communicate your decision to the Chairman of the Executive Committee, Mr. E. F. Dow, West Newton, Mass., as soon as possible.

---

### APPOINTMENTS.

Mr. Odiorne Gleason, Chairman of the Propaganda Committee, announces the following appointments of directors of Propaganda: For the Western Division, Mr. D. E. Parrish. For the Ohio Valley Division, Dr. L. A. de Vilbiss.

### NECROLOGY.

Mr. Edward Irving, of Berkeley, Cal., died the 22nd of December. Beside being an earnest Esperantist he was the author of one or two works on Astronomy.

---

### SPECIAL FINANCE COMMITTEE

The Special Finance Committee of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA hereby acknowledges the contributions and pledges given below and cordially thanks those who thus are helping in the extensive propaganda of the central office. There are several hundred other Esperantists who could spare a small amount to aid this fund, and these are again reminded. The following have been received up to the end of January and have not before been acknowledged:

#### Contributions

Marion A. Smith	\$1.00
Victor Ekman	1 00
Fred Bennett	5.00
Cash	.50
A. L. Guerard	1.00
Carl Hoffman	1.00
Cash	.25
Margaretha K. Anacker	5.00
Margaret A. Maisch	1.00
A. W. Miller	1.00
Jos. H. Noble	1.00
H. Dougherty-Trexler	1.00
F. P. Zent	1.00

#### Pledges

John W. Gough	\$10.00
W. G. Stone	\$.50 a month
W. F. Salt	1.00 a month

## Konkurso

En Chicago, kie oni parolas preskaŭ ĉiujn lingvojn de la mondo civilizita, estas necese uzi unikajn propagandilojn.

Al tiu celo, la konsilantaro de la Gradata Esperanta Societo de Chicago proponas doni premiojn al personoj, kiuj sendos la plej amuzajn anekdotojn aŭ historietojn.

### KONDISCOJ:

1. Ĝi devas esti amuza aŭ tre interesa.
2. Ĝi devas konsisti el tiaj vortoj ke neesperantisto, anglan lingvon parolanta, povus tuj ekkompreni aŭdante ĝin.
3. Ĝi devas esti verkita en komprenebla Esperanto.
4. La Gradata Societo rajtos uzi la respondadojn libere.
5. La kovertoj enhavantaj la konkursojn estos malfermitaj en publika kunveno, kiun ni anoncos poste, sed la kunveno ne okazos antaŭ la 15a de aprilo. La juĝontoj estos elektitaj en la kunveno, sed nur personoj kiuj konas krom la

angla lingvo neniun alian lingvon eĉ Esperanton.

6. Nur tiuj respondadoj estos prijuĝotaj, kiuj alvenos antaŭ la kunveno; pro tio ni konsilas ke oni sendu ilin sufiĉe frue ke ni ricevu ilin je la 15a de aprilo.

7. Ĉiu Esperantisto povas partopreni, eĉ povas sendi du konkursojn, sed neniu ricevos pli ol unu premion en tiu ĉi konkurso. Plue, ĉiu partoprenanto devas uzi pseŭdonimon kaj sendi la manuskripton al "Esperanta Oficejo de La Gradata Societo, 1669 Blue Island Ave, Chicago, Ill."

8. Vian propran nomon kaj adreson kun la pseŭdonimo sendu al "La Gradata Societo," c/o AMERIKA ESPERANTISTO, Washington, D. C. Usono."

PREMIOJ:—unua, Sm. 10.00; dua, Sm. 8.00; tria, Sm. 6.00; kvara, Sm. 4.00.

*Se oni deziras pluajn klarigojn turnu sin al D-ro B. K. Simonek, 1669 Blue Island Ave, Chicago, Ill. Usono.*

## Je La Suda Poluso

**A**NTAŬ unu jaro glatvizaĝa glatparolema libragento decidigis min aĉeti enciklopedion, sed tio ne maltrankviligas min. Eble ĝi valoras tiom, kiom mi pagis. Ĝi estas la sola enciklopedio, kiu ĉiam estas ĝishodiaŭa, sed tio ne ĝenas min. Duonjare mi ricevas multajn paĝojn da nova materialo, sed ankoraŭ mi estas trankvila. Tamen, en la lasta aldono, en paragrafo pri antarktika esplorado, mi trovis ĉi tiun esprimon: *La suda poluso staras sur ebenaĵo alta pli ol dek mil futojn, iomete kliniĝanta suden.*

Kiam mi legis tion, mia maltrankvileco komenciĝis. Unue, ebenaĵo pli alta ol dek mil futojn estas altebenaĵo, sed tio ne estas grava. Se ĝi kliniĝas, ĝi ne estas ebenaĵo, laŭ preciza maniero paroli, sed ni ne maltrankviliĝos pri tio. Tio, kio min ĉagrenas, estas la diro ke ĝi kliniĝas suden. Nun, mi jesas ke antaŭ ol oni atingas la poluson la ebenaĵo (mi volas diri altebenaĵon) eble kliniĝas suden, sed ĉe la poluso (kaj tie estas la

loko, kie la poluso troviĝas) ĝi ne povas kliniĝi suden, ĉar ĉiu direkto estas norda, kaj se oni iras iomete transen, la ebenaĵo (pardonu min, la altebenaĵo) kliniĝas norden; kaj orte je la vojira linio la ebenaĵo tute ne kliniĝas!

Mi tiom interesiĝis je la temo dum mi pensis pri ĝi, ke fine mi iris al la suda poluso kun kunulo; kaj tri futojn antaŭ ol mi atingis la poluson mi frontis norde, etendis la brakojn, kaj, rememorante mian geografion, mi diris, "Mi staras kun la vizaĝo norde, la dorso sude, la dekstra mano oriente, kaj la maldekstra mano okcidente."

Sed mia amiko, kiu staris precize ĉe la poluso, diris, "Ne, vi eraris, ĉar mi frontis simile kiel vi, kaj mia vizaĝo estis norde, la dorso estis norde, la dekstra mano norde, kaj la maldekstra mano norde!"

Mi koleriĝis kaj, frapante suden per la pugno, mi batis lin norden, kaj tiam, ekstarante kaj frontante je la sama direkto kiel antaŭe, li diris, "Ni ambaŭ eraris, ĉar nun mi staras kun la vizaĝo



sude, la dorso norde, la dekstra mano okcidente, kaj la maldekstra mano oriente.”

Mi ne povis kredi ĝin, ĉar mi staris frontante lin, kaj mi povis same diri. Li moviĝis kiam ni ortume frontis, kaj ankoraŭ li povis same diri. Tiam li turniĝis ĝis kiam la maldekstra mano estis al la poluso, kaj diris, “Nun mia vizaĝo estas okcidente, la dorso oriente, la dekstra mano norde kaj la maldekstra mano sude!”

Mi dubis ĝin, kaj por malpruvi lian diron mi staris sur la alia flanko de la poluso, same frontante, kaj veresprime anoncis; “Vi eraras, ĉar mia vizaĝo estas oriente, la dorso okcidente, la dekstra mano sude, kaj la maldekstra mano norde!”

Ni ĉesis. Tiam ni komencis studi la deklivon de la ebenaĵo, kaj rigardante de kie mi staris, mi diris, “La enciklopedio eraras, ĉar la ebenaĵo kliniĝas norden.”

Sed mia kunulo respondis kolere, “Ne, mia kara amiko, la enciklopedio ne eraras. La ebenaĵo ja kliniĝas suden!”

Varmegaj vortoj sekvis. Mi batis lin

kaj li rebatis. Mi ekkaptis lin per la gorgo, kaj li ekkaptis min per la hararo. Dum la tumulto li perdis sian bonhumoron, kaj mi perdis mian perukon, kiun mi ankoraŭ ne estas retrovinta.

Fine ni disfalis kaj trovis nin sur kontraŭaj flankoj de la poluso; kaj rigardante de kie ni staris, ni vidis ke *kaj ni kaj la enciklopedio* eraris: ĉe lia flanko la ebenaĵo kliniĝas orienten, ĉe mia flanko okcidenten. Je linio inter ni kaj la poluso ĝi tute ne kliniĝas, kaj tamen la deklivo ĉie estas je la sama direkto!”

Denove ni ĉesis. Ju pli ni pripensis kaj studis la aferon, des malpli ni sciis pri ĝi. Eble la kaŭzo estis, ke ni estis ĉe la malsupro de la terglobo kaj starantaj sur niaj kapoj. Ni forlasis la problemon. Por mi mem, pro mia estonta feliĉeco kaj spirita senĝeneco, mi konkludis akcepti la diron de la enciklopedio,—ke la suda poluso kuŝas sur ebenaĵo alta pli ol dek mil futojn, kiu iomete kliniĝas suden.

W. E. HUSE.

## ENTUZIASMA ESPERANTISTO

Por montri al la legantoj de nia interesa ĵurnalo ke inter la anoj de nia Oaklanda Esperanta grupo ni havas entuziasmulon mi rakontos al vi la jenan okazintaĵon:

Antaŭ kelkaj monatoj unu el niaj anoj, kiu loĝas en Alameda kaj kiu estas agema studanto de la kara lingvo, decidis veturi kune kun sia ĉarma edzino per aŭtomobilo al la suda parto de nia bela Kalifornio.

Sur la vojo ili haltis por pasigi la nokton en vilaĝo nomita Salinas, kaj luis ĉambro en hotelo. Post la vespermanĝo kaj promeno tra la urbeto ili iris al la ĉambro. Antaŭ ol enlitiĝi la sinjoro faris tion, kio estas lia kutimo kaj kion li rekomendas al ĉiuj Esperantistoj: li legis—ne la vesperan ĵurnalon, sed Esperantan lernolibron.

Fine ili ambaŭ dormis; sed dum la nokto ĉirkaŭ la noktmezo ili aŭdis strangajn sonojn en la koridoro,—suspektindajn paŝojn apud la pordo de sia ĉambro, kiuj similas la paŝojn de rabistoj.

## AN ENTHUSIASTIC ESPERANTIST

To show the readers of our interesting magazine that among the members of our Oakland Esperanto group we have an enthusiast I will tell you the following occurrence:

Several months ago one of our members, who lives in Alameda and who is an active student of the dear language, decided to travel along with his charming wife by automobile to the southern part of our beautiful California.

On the way they stopped to pass the night in a village called Salinas, and took a room in a hotel. After the evening meal and a walk through the town they went to their room. Before retiring the gentleman did that, which is his custom and which he recommends to all Esperantists: he read—not the evening paper but an Esperanto text-book.

Finally they both were asleep; but during the night about midnight they heard peculiar sounds in the corridor,—suspicious steps in the vicinity of the door of their room, which resembled the steps of robbers.



La brava sinjoro elsaltis el la lito, li staris atente apud la pordo, kaj dum li tie staris iu ekstere kviete turnis la por-dofermilon. La sinjoro subite kaj rapidege finis malfermi la pordon, kaj saltis en la koridoron, kie li surprizis du mal-bonulojn. Ili estis tute surprizitaj kaj timigitaj, kaj tiom konfuzitaj ke kiam ili forkuris ili kunfrapis unu la alian; unu perdis la ĉapelon kaj ambaŭ kun bruego renverse malsupren falis ĝis la fundo de la ŝtuparo. La sinjoro pri kiu ni skribas kaptis la ĉapelon perditan kaj vokis al la forkurantoj, "Se vi kuraĝas reveni, mi pugnobatos vian vizaĝon!" Sed ili ne haltis.

La edzino raportas ke kiam ŝi elmetis la kapon el la litkovriloj ŝi vidis la edzon staranta en la mezo de la ĉambro, tenanta en unu mano la ĉapelon de la vizitinto kaj en la alia sian karan vortaron,—en kiu li serĉis la Esperantan vorton por "robber" (rabisto). Jen Esperantisto entuziasma, S-ro J. B. W. F. E. C.

The brave gentleman leaped out of his bed, he stood attentively near the door, and while he was standing there some one outside quietly turned the door latch. The gentleman suddenly and speedily finished opening the door, and jumped into the corridor, where he surprised two rascals. They were wholly surprised and frightened, and so much confused that when they ran away they bumped against each other; one lost his hat and both with a great noise fell backwards clear to the bottom of the stairs. The gentleman about whom we write seized the lost hat and called to the fugitives, "if you dare to come back, I will beat your face!" But they did not stop.

The wife reports that when she put her head out from the bedcovers she saw her husband standing in the middle of the room, holding in one hand the visitor's hat, and in the other his precious dictionary,— in which he was looking up the Esperanto word for "robber." There was an Esperanto enthusiast, Mr. J. B. W.

#### ERARO DE KAMPARANO

Unu tagon kamparano portadis korb-  
bon da piroj al la kastelo de granda  
sinjoro. Sur la ŝtuparo li trovis du  
simiojn, kiuj estis vestitaj kiel infanoj.  
Iliaj vestoj estis tre belaj, kun orbrodajo.  
Ili havis ankaŭ ĉe la flanko glaveton, kaj  
ĉapelon sur la kapo. Tiuj ĉi ridindaj  
bestoj sin jetis sur la korbbon de la  
kamparano, kiu demetis respekte sian  
ĉapelon, kaj permesis al ili preni grandan  
parton de la piroj.

Tuj kiam Lia Moŝto venis kaj vidis la  
duone malplenan korbbon li demandis al  
la kamparano: "Kial ci ne plenigis la  
korbbon?"

"Via Moŝto," respondis la kamparano,  
"ĝi estis tute plena, sed la sinjoroj, viaj  
infanoj, ĵus malplenigis ĝin ĝis la duono;  
il trovis la pirojn je sia gusto, kaj mi ne  
kuraĝis deteni ilin."

*El la franca tradukis*  
EMMA T. RATHGEB.

#### A COUNTRYMAN'S MISTAKE.

One day a countryman was carrying a  
basket of pears to the castle of a great  
gentleman. On the steps he found two  
apes, which were clothed like children.  
Their garments were very handsome,  
with embroidery of gold. They had also  
little swords at their sides, and caps on  
their heads. These ridiculous animals  
threw themselves upon the basket of the  
countryman, who respectfully removed  
his cap, and allowed them to take a great  
part of the pears.

As soon as His Honor came and saw  
the half empty basket he inquired of the  
countryman: "Why didst thou not fill  
the basket?"

"Your honor," replied the countryman,  
"it was entirely full, but the gentleman,  
your children, just half emptied it; they  
found the pears to their taste, and I did  
not dare to withhold them."

*Translated from the French.*

"Kial vi nomas tiun viron, kiu ŝajne  
ametas la tutan mondon, via juvelo?"  
"Car li estas ametisto."

## Anekdoto el la Sekreta Servo

**A**N la jaro 1897 mia posteno en la usona Sekreta Servo estis en la urbo Sankta Paŭlo, en Minnesota. Dum la monatoj julio kaj aŭgusto multaj falsaj kvindolaraj biletoj rondiris en la urbo. La afero estis tre mistera kaj post tri semajnoj da diligenta laboro miaj helpantoj kaj mi estis akirintaj nenian valoran informon, escepte de priskribo de iu fremdulo, kiu kredeble povus esti la kulpulo.

Unu vesperon ĉirkaŭ la krepusko mi estis staranta ĉe stratangulo en nekonata najbaraĵo, vestite kiel laboristo, profunde kaj iom malgaje pripensante nian malmultan sukceson ĝis tiu tempo. Ĉar mi intencis resti en tiu kvartalo ĝis malfrua horo, kaj pro tio, ke mi estis laca kaj malsata, mi eniris apudan malgrandan kafejon, kies elpendaĵo montris ke ĝia mastro estas Marko Antonio, ankaŭ ke bongusta manĝaĵo kaj trinkaĵo estas tie havebla.

Sidiĝinte ĉe tablo en la trinkejĉambro, mi mendis iom da manĝaĵo kaj glason da biero, tiam komencis legi mian vesperan ĵurnalon. Post iom da tempo eniris viro, kiu povus konformi je la supre nomita nedifinita priskribo, kvankam la koincidaĵo ŝajnis apenaŭ rimarkinda. Li staris ĉe la fino de la trinkajvenda tablo, kaj ŝajne interparolis konfidence kun Antonio, la mastro. Post ĉirkaŭ dek kvin minutoj la viro eliris, kaj mi sekvis tuj poste. Enpaŝinte ŝtuparejon mi rapide elprenis el mia poŝo maldikan ĉapon, kiun mi surmetis, postlasante mian pajlan ĉapelon; ankaŭ mi surmetis okulvitrojn, kiujn mi ĉiam portadis por tiaj okazoj. Do, en la nebrila lumo arta mi facile sekvis la viron sen danĝero ke li min rekonu pro mia ĉeesto en la kafejo.

Li marŝis preskaŭ ĝis la alia flanko de la urbo, kie li eniris malgrandan butikon kaj aĉetis cigaron por kvin cendoj. Mi ruzis tra la fenestro ke li donis kvindolaran bileton al la butikisto, kaj tuj foriris. Mi tiam eniris la saman butikon kaj aĉetis cigaron, dirante al la butikisto ke mi deziras havigi al mi kvindolaran

bileton por enmeti en leteron, kiun mi estas sendonta al mia edzino. Kiam li donis al mi la kvindolaran bileton mi vidis ke ĝi estas unu el la falsaj kvindolaraj biletoj, kiuj faris al mi tiom da laboro je la elserĉado de kulpuloj; mi tial diris al la butikisto ke ĝi ŝajnas al mi iom stranga, kaj li respondis ke ĝi estas la sola kvindolara bileto en la montirkesto, kaj ke li ĵus ricevis ĝin de nekonnata fremdulo, kiu aĉetis cigaron antaŭ ne pli ol unu minuto.

Mi rapidis eksteren, kaj denove sekvis la viron, kiu reiris al tiu unua kafejo, kaj ĝin ree eniris. Elveninte post duonhoro li iris al domo malproksima kvin stratangulojn de la kafejo, eniris ĝin kaj tie restis ĝis kiam la lumoj en la domo estingiĝis. Observinte tion, mi eksciis ke tiu domo estas lia hejmo.

De tiu tempo mi sciis preskaŭ ĉiujn moviĝojn de tiu viro, kiel ankaŭ de Marko Antonio, ĉar mi aranĝis la sekvintan tagon ke unu el miaj helpantoj, juna italo kiun mi nomos Petro, eniru la kafejon de Antonio kaj konatiĝu kun li, pretekstante ke li deziras okupon. Petro fariĝis bona amiko de Antonio, tial ke li aĉetis preskaŭ ĉiun el siaj manĝoj tie ĉe Antonio, kaj kompreneble Petro amikiĝis kun la amiko de Antonio, kiu elpagis la falsan bileton, kiel supre rakontite, kaj baldaŭ fariĝis ofta vizitanto ĉe lia hejmo. La nomo de ĉi tiu viro estis Tomaso Anĝelo. Li estis laborema maŝinisto, kiu havis du infanojn, dudekjaran knabon kaj deknaŭjaran filinon tre belan.

Dume, alia helpanto mia kaŝe sekvis Anĝelon kaj eksciis ke tiu diligente laboras ĉiutage je sia metio, kaj en ĉiu semajno li elpagis vespere proksimume dek falsajn kvindolarajn biletojn. Unu tagon Petro diris al S-ro Antonio ke antaŭ nelonge li estas ellasita el malliberejo, kien oni sendis lin en la ŝtato Ohio pro la elpagado de falsa mono. La ruzajo bone efikis. Post singardema demandado pri la sperto de Petro ĉe la elpagado de falsa mono, Antonio diris ke li scias kie li povos havigi al si tiom da falsaj kvindolaraj biletoj, kiom li de-

ziras. Li certigis ke la biletoj estas mirinde perfektaj imitaĵoj, kaj ke li povos ilin vendi al Petro po kvindek procento.

Kompreneble Petro konsentis kaj en la postmorgaŭa tago Antonio liveris al Petro dek belegajn falsajn kvindolarajn biletojn. Mi nun havis sufiĉegan pruvon kontraŭ la du viroj, sed ne sciis kiu faris la falsan monon aŭ kie. Tamen ni forte suspektis ke ĝin faras S-ro Marko Antonio, en la subtera etaĝo de sia kafejo. Plie ni konvinkigis ke li mem allogis Anĝelon al la elpagado de la falsa mono, kaj ke Anĝelo mem scias nenion pri ĝia falseco. Ni ankaŭ konvinkigis ke nek la filino nek la filo de Anĝelo scias ke ilia patro elpagas falsan monon. Anĝelo ne havis edzinon, ĉar ŝi mortis antaŭ du jaroj.

Unu nokton je la dua horo mi ŝteliris kun helpanto al la malantaŭa flanko de la kafejo de Antonio, kaj kviete forprenis fenestron de la fundamenta muro de la konstruaĵo. Enirinte la kelon, ni trovis tie belegan presilon kaj kliŝaĵon, ankaŭ grandan nombron da falsaj kvindolaraj biletoj.

Baldaŭ post tio okazis la juĝado de la du viroj, kaj la gastema juĝisto donis ĝentilan inviton al S-ro Marko Antonio ke li loĝu kaj manĝu je la kosto de la Stato dum la venontaj dek jaroj, en granda konstruaĵo, iafoje nomita malliberejo. Kvankam Antonio havis multajn aferojn, kiuj bezonis lian atenton, li sentis sin devigata akcepti la inviton, tamen li ne ŝajnis dankema. Anĝelo ricevis kiel punon unu jaron en la malliberejo, kaj tiu templimo aŭtomate malplilongigis ĝis dek monatoj, pro lia bona konduto. En la tago de lia reiro al lia hejmo okazis la edziĝo de lia bela filino kaj mia helpanto Petro, kiu ekŝigis el la Sekreta Servo kaj aĉetis farmbienon apud malgranda urbo en la ŝtato Iowa, kie li kaj lia edzino nun loĝas kaj prosperas.

Anĝelo loĝas ĉe sia bofilo, laboras je sia metio, kaj estas respektinda kaj utila civitano de la komunumo. Pro la afero mi perdis bonegan helpanton, tamen bela kaj inda fraŭlino trovis bonegan edzon, tial mi ne plendas pri mia perdo.

W. P. WALSH.

---

#### EXTRACT FROM A LETTER.

"If people would only talk about Esperanto a little more and if they would write about it oftener the movement would grow much faster than it does. We had an experience here that goes to prove that it is necessary to advertise almost day and night. Now you know how much publicity we have had; the papers have given space to our news, the Commercial Club had helped us a little, and the Carnival Association even chose an Esperanto name, but in spite of all this there are people here who do not know that an Esperanto club exists. There is a certain young woman here, of excellent education, who works in the

